

Ekumene kaj Esperante en Ĉeĥio

Sume 76 partoprenantoj el 14 landoj (Aŭstrio, Ĉeĥa Respubliko, Estonio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Kroatio, Pollando, Rumanio, Slovakio, Svedio kaj Ukrainio) renkontiĝis la 6-13an de aŭgusto en la 22a Ekumena Esperanto-Kongreso, okazinta en la fama bohemia banloka urbo Poděbrady.

Poděbrady mezepoke estis rezidejo de la reĝo Georgo (1420-1471), kiu estis bonega ekonomo kaj diplomato. Dum lia regado en Bohemio povis kunekzisti utrakvistoj (parto de la husana movado) kaj romkatolikoj, ankaŭ aliaj eklezioj kaj sektoj. Tiam tio estis nekredebla religia libereco, kiu en aliaj landoj ne ekzistis. Jam en la 15a jarcento la reĝo proponis al aliaj eŭropaj regantoj krei la komunumon, kiu kapablus kunlabori kaj komune defendi Eŭropon kontraŭ turkaj atakoj. La genia projekto de mezepokaj Unuiĝintaj Nacioj de la saĝa ĉeĥa reĝo fiaskis pro la etanim-eco de aliaj eŭropaj potenculoj.



En Poděbrady jam longe laboras agema esperantista klubo kaj ekzistas “Aleo Esperanto” en la publika parko sur bordo de la rivero Elbo.

La 22a Ekumena Esperanto-Kongreso, samtempe estis la 70a kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj la 68a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI). La temo de la Kongreso estis “Akvo”. Ne nur pro varma, senpluva vetero, pro kiu suferas multe da landoj inkluzive de Ĉeĥa Respubliko, sed pro urĝa neceso refreŝigi soifajn animojn.

Danke al la zorgo de fratoj Pavel kaj Tomáš Polnický, sinjorino Jindřiška Dubinová kaj laborantoj de la mezlernejo ĉio estis bonega organizita. Pri bona etoso zorgis la prezidanto de KELI Philippe Cousson, pastro Serhij Prudko, pastoro Pavel Klimeš kaj muzikistoj Ernst Leuze kaj Agneta Järström.

La direktorino de la agrokultura mezlernejo Milena Kavková, la urbestro de Poděbrady Ladislav Langr kaj la predikanto de la Frata Eklezio Pavel Paluchník, kiuj estis gastoj de solena inaŭguro, estis plezure surprizitaj de la plenvoĉe kantata himno “La Espero”. La ĉefa organizanto Pavel Polnický tradukis al ili la alparolojn de la prezidantoj de IKUE (Giovanni Daminelli) kaj KELI (Philippe Cousson).

Post matenaj preĝoj, matenmanĝo kaj komuna kantado sekvadis prelegoj pri ekumenismo, Francisko Valdomiro Lorenc, unuiĝintaj eklezioj, papo Francisko, Biblio de Kralice, apostoloj kaj iliaj atributoj, la 100-jara datreveno de Ĉeĥofrata Evangelia Eklezio kaj pri Estonio. Okazis jarkunvenoj de IKUE kaj KELI kaj ankaŭ de la kristana sekcio de ĈEA. Novaj libroj pri religio kaj aliaj temoj estis prezentitaj.

Dum ekskursoj la partoprenantoj konatiĝis kun Poděbrady, Kutná Hora, Kolín,

Chlumeč nad Cidlinou, Kladruby nad Labem, Přerov nad Labem kaj Rožďalovice. La kongresanoj partoprenis en mesoj kaj diservoj en Poděbrady, Kolín kaj Lysá nad Labem. Koncertoj de Richard Haan, solisto de la Nacia Teatro en Prago, kaj Jolana Haan Smyčková, kantistino de la teatro “Semafor” en Prago, kaj loka ĥoro de Sankta Cecilio estis varme akceptitaj kaj bonege aplaŭditaj.

Oldřich Arnošt Fischer

BET-54

Ĉi-jare kolektiĝis amika Esperanto-familio de Baltiaj landoj kaj gastoj al la 54aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-54) en la estonia urbo Pärnu. Estis 70 partoprenantoj el 11 landoj. Tiuj, kiuj kutimiĝis ligi BETojn kun grandaj organizaj komitatoj, bultenoj, centoj da dormoĉambroj, vastaj manĝejoj, presitaj programoj, multnombraj informstandoj, ekspozicioj, seminarioj ktp, eble sentis malkontenton pro parte ĥaosa organizado. La preznivelo ne favoris la organizantojn; iam aktivaj estoniaj samideanoj iom post iom malaperis, niaj vicoj fatale maldensiĝis. Tamen je nia dispono estis granda urbodoma salono, somera sunbrila vetero kaj optimismaj esperantistoj.

Laŭ sia formo BET estas esence konferenco, kaj tial gravas prezentitaj prelegoj. Ili donas signifon al la aranĝo. Inter la preleganoj estis Giorgio Silfer, Perla Martinelli, Vjaĉeslav Hromov, Madis Linnamägi, Vytautas Šilas, Margarita Želve kaj multaj aliaj. Vespere amuzis nin muzikistoj kaj familia ensemblo de Kalle Vilbaste. La ekskursojn en Pärnu kaj sur la insulo Kihnu helpis organizi lokaj esperantistoj.

Esperanto estas parto de intelekta kulturo de la homaro, kaj ĝi devas adaptiĝi en pli kaj pli rapide evoluinta teknologia mondo. Multaj eble scias pri la ekzisto de Esperanto, sed ne konas ĝian pacan kaj demokratian idearon. La urbestro de Pärnu ne havis tempon nin saluti, sed li sendis ĉarman virinon el kultura fako, kiu deziris sukceson al ni kaj al nia sekreta lingvo. Kiel diris klasikulo, ni ne parolu pri misrikolto, ni fosu niajn kampojn kaj semu nian semon.

Tõnu Hirsik

